BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO
de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

7-a Jaro | Numero 7-8

JARABONO
En Brazilio 3$000
Ekzterlande 5 fr. (2 Sm.)

JULIO-AŬGUSTO 1916

REDAKCIO—PRAÇA QUINZE DE NOVEMBRO
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

"Brazila Esperantisto"

Pedimos a attenção dos nossos samideanos para as seguintes disposições do Regulamento da B. L. E.:

Os grupos filiados pagam uma quota annual de, pelo menos, 15$000, correspondente a seis socios.

Os socios isolados pagam a contribuição annual de 5$000.

Qualquer socio de grupo filiado poderá adherir a B. L. E. pagando apenas a quota annual de 2$500.

Não ha joia.

As pessoas que remetterem a importancia de 10$000 são consideradas socios da B. L. E. e *helpabonantoj*.

Todos os socios recebem gratuitamente o "Brazila Esperantisto".

Brazila Ligo Esperantisto

Pagaram suas quotas referentes ao anno de 1915 as seguintes pessoas: Dr. E. Backheuser, Engº. Alberto Couto Fernandes, Engº. H. Motta Mendes, E. Felix Tribouillet, Major Lauriano das Trinas, Dr. Nerval de Gouveia, Dr. Nuno Baena, Azarias de Azevedo, D. Maria Mac-Guines, Dr. Antonio Carlos de Arruda Beltrão, Manoel Lopes Ivort, Severino Soares de Freitas, Dr. Leonel Gonzaga da Fonseca, Ovidio de Castro, Coronel Manoel Portilho Bentes, Joaquim da Rocha Cerqueira, Dr. José A. Boiteux, Odillo Pinto, Flavio Norte, Arminio de Moraes, Anisio Magalhães Braga, Humberto Chaves, J. Augusto Chaves, Octavio de Azevedo Macedo, Alcindo Terra e Dr. Venancio Nogueira da Silva, socios do *Brazila Klubo "Esperanto"*; seis socios do *Brazila Esperantista Klubo;* senhorita Romancina Calmon, D. Romana Forster Vidal (até Junho) e mais seis socias do *Virina Klubo;* Antero Barroso Junior, Alcindo Heraclito Brito e mais quatro socios do *Esperantista Klubo "Junularo"*; Domingos de Castro Perdigão, Manoel Gomes de Castro, José d'Alencar Pereira de Castro, senhorita Ignez Leal Frazão, senhorita Hermelinda Rosa Maramaldo e José Maria dos Reis Perdigão, socios do *Grupo Esperantista "Couto Fernandes"*; Dr. João Keating, Dr. João B. Mello e Souza, Dr. Reinaldo Geyer, A. Caetano Coutinho, D. Irene Amelia Santos, Dr. Methodio Maranhão, Dr. Haroldo Amaral, Tenente Arthur Paulino de Souza, Manoel dos Santos Lostada, Eng.º Henrique E. Couto Fernandes, Ismael Gomes Braga, Manoel Lopes Ivort, Reinaldo Kieling Germany, José Pedro Franz, senhorita Antoninha Barum, Dr. Theophilo de Almeida (até Junho), Jayme Martins de Souza, Arminio de Moraes, Eng.º Arthur N. Gomes Pereira da Silva, João Teixeira de Siqueira Magalhães, Horacio Gomes, Targino Soares, Eng.º Alvaro Rodovalho Marcondes dos Reys (até Junho), R. Fortunato, Mario de Souza Nogueira (até Junho), João Martinho Ferreira Gomes (até Junho), Areovaldo de Almeida, Lauro Castro Magalhães (até Junho), Capitão Antonio Pinho, Tercio Rosado Maia, senhorita Maria Eulalia da Costa, Arthur Pereira dos Santos, Francisco V. Lorenz, Wolfram de Almeida Cotta, Tiburcio Guilherme dos Santos e Tomas Valka, socios isolados.

Ao "Virina Klubo" enviamos sinceros agradecimentos pelo donativo de 50$000 feito á *Brazila Ligo Esperantista*.

Sesa Brazila Kongreso de Esperanto

Aracajú — Sergipe. 2 — 6 de Januaro 1917

UNUA CIRKULERO

Laŭ oni decidis dum la Kvina, okazos en Aracajú, de la 2a ĝis la 6a de Januaro 1917, la Sesa Brazila Kongreso de Esperanto.

La malgranda kaj ĉarma ĉefurbo de Sergipe, kiu prave kaj jam de longe fieras esti centro, kie intense kaj obstine oni diskonigas Esperanton, havos la gloron esti la unua norda urbo, kiu vidas kongrese kunvenintaj la brazilajn esperantistojn.

La periodaj kunvenoj de l' anoj de l' Zamenhofa idealo, krom tio, ke ili estas treege gravaj por la disvastigo de tiu belega idealo, estas antaŭ ĉio fortobilanco, komparebla je tiu muskola streĉiĝo, per kiu la batalantoj hardiĝas por la daŭrigo de l' batalo.

Venu do al la modesta Aracajú, kuraĝaj samideanoj, sindonemaj pioniroj de l' esperanta brazila movado, malnovaj kaj novaj militistoj de la Granda Ideo; venu ĉiuj por nia honoro, por la venko de Esperanto kaj konfuziĝo de l' skeptikuloj! Venu!

En tiu ĉi malgranda urbo ni ĉiuj—tiuj, kiuj estas viaj samideanoj, kaj tiuj, kiuj ne aliĝis ankoraŭ al nia afero—atendas vin kun etenditaj brakoj kaj penos fari al vi indan gastigon.

—

La Organiza Komitato kiel eble plej klopodos por elpeti rebaton pri la vojaĝaj biletoj de l' samideanoj, kiuj, almenaŭ du monatojn antaŭ la Kongreso, petos tiun favoron;.

ĝi ebligos, ke la hoteloj kaj gastejoj ĉi tieaj konsentu malplialtigi siajn tagprezojn;

ĝi klopodos pri la ebla komforto de l' kongresanoj, dum ilia estado en tiu ĉi ĉefurbo;

ĝi efektivigos, dum la Kongresa tempo, paroladojn, muzikajn vesperfestojn, promenadojn, piknikojn, balojn, spektaklojn, k. t. p., laŭ la programa baldaŭ organizota kaj dissendota al la kongresanoj.

La Organiza Komitato

Dro. Alcibiades Corrêa Paes, prezidanto;
Hemeterio de Gouveia e Silva, vicprezidanto;
Norma Reis, unua sekretariino;
Sebastião Albuquerque, dua sekretario;
Pedro Machado, kasisto.

Sexto Congresso Brasileiro de Esperanto

Aracajú—Sergipe. De 2 a 6 de Janeiro de 1917

PRIMEIRA CIRCULAR

Consoante o resolvido pelo *Quinto*, reunir-se-á em Aracajú, de 2 a 6 de Janeiro de 1917, o Sexto Congresso Brasileiro de Esperanto.

A pequena e graciosa capital de Sergipe ao justo orgulho de vir sendo, muito ha, um nucleo de intensa e tenaz propaganda esperantista vae juntar a gloria de ser a primeira cidade nortista que verá reunidos em congresso os esperantistas brasileiros.

De transcendente importancia para a propaganda do ideal de Zamenhof, as reuniões periodicas dos legionarios desse formoso ideal são, antes de tudo, um balanço de forças, um como esse retesar de musculos com que os luctadores se enrijam para a continuação da justa.

Vinde, pois, á modesta Aracajú, esforçados *samideanos*, abnegados pioneiros do movimento esperantista do Brasil, antigos e novos cruzados da Grande Idéa; vinde todos, para honra nossa, victoria do Esperanto e confusão dos scepticos! Vinde!

Nesta pequenina terra, os que somos vossos *samideanos*, e os que ainda não o são, todos, vos esperamos de braços abertos e procuraremos dar-vos condigna acolhida.

—

A Commissão Organizadora envidará todos os esforços afim de obter abatimento nos bilhetes de passagem para os *samideanos* que, pelo menos dois mezes antes do Congresso, solicitarem esse favor;

conseguirá razoavel reducção nas diarias dos hoteis e casas de pensão desta cidade;

esforçar-se-á para que aos congressistas não falte relativo conforto durante a sua estadia nesta capital;

fará realizar, ao tempo do Congresso, conferencias literarias, serões musicaes, passeios, convescotes, bailes, espectaculos, etc., conforme o programma que será organizado opportunamente e distribuido pelos congressistas.

A Commissão Organizadora

Dr. Alcibiades Corrêa Paes, presidente;
Hemeterio de Gouveia e Silva, vice-presidente;
Norma Reis, 1.a secretaria;
Sebastião Albuqerque, 2.o secretario;
Pedro Machado, thesoureiro.

KOTIZAĴO

CIU PERSONO 5$000

CIU SOCIETO 10$000

KUŜAS SOMERO

Kuŝas somero la varma
Sur via rozeta vangeto,
Kuŝas la vintro malvarma
En via malgranda koreto.
Tio ĉi baldaŭ sin ŝanĝos,
Ho, mia kara trezoro!
Vintro sin trovos sur vangoj,
Somero la varma en koro!

(El Fundamenta Krestomatio)

O calor de ardente estio

O calor de ardente estio
Tens no teu rosto formoso,
No coração tens o frio
De um inverno rigoroso.
Mudará tudo isto em breve,
O' minha doce illusão!
Nas faces terás a neve
E as chammas no coração!

A. Mourinho.

Dio

(Poezio el Aleksandro Herkulano)

(Tradukita de B. Martins d'Almeida, Bemaldo)

Je la silentaj horoj, je noktmezo,
Vin, ho Dio, mi kantlaŭdos!
Kaj la bruantaj maroj, kaj la Tero,
Kaj l' Infero eĉ min aŭdos.
Tra la ĉiela regn' la kanto sonu;
La arĝenta luno brila
En sia turno haltu, dum al Dio
Harpon ludos mi hum la.
Ankoraŭ ne ekzistis Tempo, tamen
Eternec' senfina estis;
La dian grandegecon la senviva
Solegeco nur atestis.
Sed Li ekzistis, sed Li ekzistadis,
Kaj krom Li nur la Nenio.
La homan vivon gardis Li ankoraŭ
Envolvitan en embrio;
Ankoraŭ de la Mond' li fundamentojn,
Kaŝis Li en sia menso;
Kaj la brilantaj astroj ne moviĝis
En la vasta spaca denso.
Jen Universo, Tempo kaj Movado
Ŝprucas el kreestra koro;
Eklumas Suno super Ter' senhoma
Kaj burĝonas unu floro.
Sur nevidebla aks' la glob' turniras;
Ekaŭdiĝas ventblovado,
La maroj ekbruegas, kaj ekvivas
La naturo en kreskado.
Ho Dio! kiu inde kaj kapable
Kante laŭdos vian povon?
Ho! kiu kantos la misteran forton
Kiu kreis vivon, movon,
Kaj kiu donis nin la mirindaĵojn,
La glaciigitajn montojn
Kaj kiu en la plej profundajn valojn
Enfluigis riverfontojn?!

Mi kie estis kiam l' Eternulo
Per potenca dia Vorto
La ekvilibron en la Spaco kreis
De la Universa Forto?
Mi kie do ekzistis? En genezo
De l' estontaj kreituloj—
En la spirito dia.—Lin mi laŭdu
Sur la ĉiuj terangulo j!

Averto al parkeruloj

Domingos José Gonçalves de Magalhães
(Visconde de Araguaya)

Pia pastro en fasttempo
Diris predikon parkeran,
Pentrànte en nigraj trajtoj
La turmentaron inferan.
Sed subite eksilentis
La fluo de l' retoriko;
Li ne povis rememori
Ion plu el la prediko.
"Malfeliĉa!" (tiel oni
Aŭdis iun ŝerce diri;)
"Li sin metis en l' inferon
Kaj forgesis eĉ eliri".

Tradukis

Francisco V. Lorenz

La tri animoj

Suprenirante en la ĉielon iris tri virgulinaj animoj.

La luno ilin ĉirkaŭprenis per unu radio kaj la steloj eklumiĝis por ilin ricevi.

Ili ekinterparolis.

—Mi estis princino, diris unu. Sur mia maŭzoleo estas ora palmo kaj b'anka marmora serafo. Mi saŭdadas mian palacon.

—Mi estis monaĥino, diris alia. Sur mian tombon falas psalmoj de la religiulinoj kaj floroj de la piulinoj. Mia korpo estas en la monaĥejo, kun Dio. Mi havas saŭdadojn je la mistikaj harmonioj de la harmoniumo dum la festaj tagoj.

—Kaj la tria diris:—Mi estis paŝtistino. Mia korpo estas en la tombejo de la vilaĝo. Mia fianĉo ĝin gardas, kaj, ĉar ne estas floroj, li ploras ĉiunokte sur mia tombo sincerajn larmojn. Mi havas saŭdadojn je mia fianĉo.

—Kaj unu stelo aŭdinta la interparolon de l' animoj, demandis al alia stelo:—Kia estas la plej feliĉa el la tri animoj?

—La fianĉino, ĉar ĝi estis amita, —respondis la stelo sopirante.

Tradukis

Odillo Pinto

RAKONTETO

(*A. Dias*)

Blua birdeto lasis malgrandan graneton sur senkultura tero. Karesa venteto kisis tiun grajneton, nokta roso surverŝis tiun teron, kaj la grajneto ĝermis...

Aperis burĝono, kiu, karesita per dolĉa venteto, kreskis... kreskis... El la fleksebla verda trunketo, ekkreskis bela floreto, alia, alia... pli alia...

Sed la varma kaj senkompata suno jetis siajn ruĝajn radiojn sur la malfeliĉan vegetaĵeton.

Tuj estis bruligitaj la palbluaj florfolietoj, absorbita la nokta roso, kaj la kreskaĵo velkis kaj mortis...

Estis ankaŭ tiel sama nia amikeco.

Viaj multaj rigardoj ĵetis iam en mian koron, ĝis tiam malvarma kaj nesentema, la grajneton de la amo; poste la venteto de viaj belaj ridetoj karesis ĝin tre dolĉe; la viviga roso de viaj vortoj delikate surverŝis ĝin, kaj la amo kreskis fortege en mia koro, kiu, kredante al viaj promesoj kaj amesprimoj, pensigis min pri neeblaj revoj.

Aperis sur la delikata trunketo de la amo la bela verdfloreto de la espero.

Sed la kruela suno de via malfideleco bruligis la floron de la amo, absorbis la roson, kiu nutradis tiun sinceran mian amon, kiu, forlasita, kliniĝis... velkis kaj mortis...

Esperantigis

Alcindo Brito.

Teixeiras—Minas.

Notas Sociaes

Um decennio de existencia, para uma instituição que visa exclusivamente fins de altruismo e desinteresse, já representa, sem a menor duvida, um bellissimo resultado e um justo motivo de orgulho.

Taes casos são raros, infelizmente, em nosso meio por multiplas circumstancias, e, principalmente, em nossa epocha, por circumstancias não menos ponderosas, e bastante conhecidas para que nos demoremos a expol-as.

As associações destinadas a pugnar por idéas e que não satisfazem interesses pessoaes immediatos ou futuros, arrastam uma existencia precaria, quando não tenham a duração das clas-icas rosas de Malherbe.

E' natural, pois, que se alegrem os esperantistas brasileiros. Ha dez annos, na data de hoje, era fundado nesta capital o "Brazila Klubo Esperanto", presentemente o mais antigo dos clubs brasileiros consagrados á propaganda e no cultivo do idioma auxiliar internacional com que o genio de Zamenhof dotou o mundo civilizado.

Durante muito tempo foi o "Brazila Klubo Esperanto" o maior pioneiro do esperantismo no Brasil. Mais tarde, coube esse papel á Liga Esperantista, creada para centralizar e dirigir os trabalhos em todo o paiz. Mas o "Klubo" nem por isso deixou de se esforçar, como sempre, e os resultados de sua acção dedicada e pertinaz são conhecidos pelos *samideanos* no Brasil e fóra delle.

Os esperantistas festejarão a data de hoje, além das sessões habituaes, com um banquete a que nos referimos em outro logar.

("O Imparcial", de 29 de Junho.)

NEKROLOGIO

Kapitano L. E. Meier

Germanaj esperantistoj suferis gravan perdon.

La 2.an de Januaro mortis kapitano L. E. Meier, el Munchen. Li estis unu el la esperantistoj de la unua fazo de Esperanto, de la jaro 1888, la dua jaro post la apero de Lingvo Internacia. Bonaj tradukoj estis de li faritaj, konataj de la mondo esperantista: Esperanto-Kantaro, Wilhelm Tell, Kvin Noveloj, Edziĝa Festo en Capri, kaj multaj aliaj.

Esperanto e Cruz Vermelha

Quando Zamenhof, ha mais de cinco lustros, apresentava ao mundo civilisado a sua genial creação, movido pelo elevado sentimento de paz entre os homens, pensava certamente no uso que viria a ter



Capitão Bayol, do 5.º Reg. de Inf do Exercito Francez, fallecido em combate em 1915.

na manifestação mais sublime da fraternidade, n'essa que é feita nos campos de batalha pelos abnegados apostolos da *Cruz Vermelha*.

Não uma, porém muitas vezes, o genio da destruição tem posto e continúa a pôr, frente á frente, homens de raças, nacionalidades e linguas differentes, n'uma ancia louca de exterminio. Interrompido o fragor da batalha, a Humanidade conservadora entra em scena, e pelo menos derrama, serena, o balsamo da consolação, quando não póde curar ou alliviar.

Da iniciativa, tenacidade e philantropia do suisso Henry Dunant, surgiu a grandiosa instituição que é bem a expressão grandiloqua da fraternidade humana. A campanha pratica, iniciada em Solferino, terminou pela grande victoria, que foi a Convenção de Genebra.

Os serviços que a *Cruz Vermelha* têm prestado glorificam Henry Dunant.

Esta admiravel organisação, porém, ficaria incompleta sem a adopção de uma linguagem, que permitisse fazer esquecer por momentos o soffrimento e apressar a cura, pela influencia efficaz de uma palavra carinhosa perfeitamente entendida. A creação da *Cruz Vermelha Esperantista*, que não é mais do que a propaganda pratica do Esperanto nos serviços da *Cruz Vermelha*, pertence ao capitão Bayol, quando instructor na Escola Militar de Saint-Cyr. Factos de hoje e de sempre vêm apoiar a idéa do capitão Bayol. Os serviços da *Cruz Vermelha* não são reclamados somente em tempo de guerra. Na paz ou na guerra, é evidente que a falta de intercomprehensão entre salvadores e soccorridos occasiona graves inconvenientes: cuidados mais difficeis de prestar, soffrimentos que duram mais tempo que o habitual, ultimas vontades mal comprehendidas ou absolutamente incomprehensiveis; excitação, desasocego, desanimo, que os traductores, mais ou menos habeis, nem sempre conseguem evitar.

A Cruz Vermelha é uma das instituições em que uma linguagem commum é indispensavel. E' essa linguagem deve ser simples, harmoniosa, facil de aprender, que possa ser traduzida sem outro auxilio que o de um diccionario, que consinta ser falada depois de rapidas explicações e em algumas horas de exercicio.

Não ha lingua nacional alguma nestas condições. E' preciso, então, adoptar uma internacional que possúa os predicados exigidos: essa lingua internacional auxiliar é o Esperanto.

Como o capitão Bayol, façamos votos para que possa a Estrella Verde do Esperanto unida á *Cruz Vermelha* de Genebra, facilitando as relações internacionaes, permittir ás pessoas generosas que trazem o braçal da *Cruz Vermelha* fazer maior somma de beneficios.

Dr. Nuno Baena

(*Do "Boletim da Sociedade da Cruz Vermelha Brazileira"*)

KRONIKO

Sergipe. — "Esperanta Klubo", en *Aracajú*, vigle laboras por ke la 6.a Brazila Kongreso de Esperanto, tie okazonta en Januaro 1917.a, bone sukcesu. Ni jam ricevis la unuan cirkuleron, kiun ni publikigas aliloke. Dro Alcibiades Paes kaj s-ro Sebastião de Albuquerque gvidas kursojn kun multaj gelernantoj. Antaŭen!

Rio de Janeiro. — La 29an de Junio la anoj de Brazila Klubo "Esperanto" festis la 10an datrevenon de ĝia fondo per vespermanĝo, kiu okazis en la restoracio "Rio Branco" meze de granda ĝojo kaj entuziasmo. Fino Irany Baggi de Araujo legis la raporton de l' antaŭa vespermanĝo kaj oni elektis d-ron Venancio da Silva kiel raportonton. Laŭ proponoj de s-ro Mello e Souza, Theophilo de Almeida kaj Azarias de Azevedo oni decidis telegrafi al droj Ner-

val de Gouvea, bonfarinta ano, kaj Nuno Baena, prezidanto de l' klubo, kiuj pro malsano ne povis ĉeesti la vespermanĝon kaj al la ĵurnalo "O Paiz" en kies salono efektiviĝis la fondo de Brazila Klubo. Salutis la klubon s-roj Octavio de Macedo en la nomo de Brazila Esperantista Klubo kaj A. Couto Fernandes, prezidanto de B. L. E., interpretante la sento'n de ĉiuj brazilaj esperantistoj. S-ro H. Motta Mendes, vicprezidanto de Brazila Klubo, dankis la salutojn. Dro Venancio da Silva faris entuziasman toaston al la Gazetaro de Rio de Janeiro, al kiu multe ŝuldas la propagando de Esperanto en Brazilio. La honora toasto al dro Zamenhof estis farita de l' studento Ruy Pinheiro Guimarães.

—La 1.an de Julio okazis kunveno de "Virina Klubo" por aŭdi la paroladeton de dro Venancio da Silva pri "La Vortfarado en Esperanto".

La 8an de Julio okazis solena kunsido de Brazila Klubo "Esperanto" por posediĝo de ĝia nova estraro. D-ro Nuno Baena, malferminte la kunsidon transdonis la prezidantecon al dro E. Backheuser, honora prezidanto de l' klubo. Post la legado de l' protokolo, dro Nuno Baena, kiu estis reelektita prezidanto, legis sian tre detalan raporton. Li faris alvokon al ĉiuj klubanoj petante, ke ili helpu la eldonon de Brazila Esperantisto, ne nur per mono, sed ankaŭ per kunlaboro, kaj proponis la starigon de *Karavano Esperantista* por viziti la pinakotekojn, ĝardenojn, montojn kaj ĉiujn aliajn vidindaĵojn en *Rio de Janeiro* kaj ĉirkaŭaĵoj. Sro A. Couto Fernandes proponis, ke la Klubo sendu telegramon al ĉiuj ĵurnaloj en *Rio de Janeiro* pro la valorai helpoj ĉiam donitaj al la propagando de Esperanto en Brazilio Tiu ĉi propono estis aprobita meze de aplaŭdoj. Dro Backheuser per belegaj vortoj dankis sian elekton por prezidi la kunsidon. Ĉiuj ĵurnaloj parolis pri la datreveno de Brazila Klubo kaj la gazeto "União Postal" aperigis belan artikolon de sro Flavio Norte.

—Dro Nuno Baena malfermis je la 18a de Julio pratikan kurson de Esperanto, kiu funkcias ĉiumarde en la sidejo de B. K. E.

—La unua numero de l' Bulteno de la Societo de Brazila Ruĝa Kruco, kies prezidanto estas Generalo T aumra ur o e Azevedo, publikigis la portreton de Kapitano Bayol kaj artikolon de dro Nuno Baena pri "Esperanto kaj Ruĝa Kruco". Ĝi aperigis ankaŭ tradukon de artikolo pri la Historio de l' Ruĝa Kruco aperinta en Germana Esperantisto.

La 3.an de Aŭgusto okazis la 26a. kunveno de Virina Klubo por elekto de ĝia nova estraro, kiu estas nun la jena : prez—sino Adelina Lopes Vieira ; vicprez.—sino Dioguina Chalreo Corrêa ; 1a sek.—fino Irany Baggi de Araujo ; 2a sek.— ino Romancina Calmon kaj kas—sino Orizaba Guimarães. Por solenigi sian 4an datrevenon Virina Klubo donacis monsumon al Brazila Ligo Esperantista kaj Riliĝejo N. S. de Pompéa. Niajn plej korajn dankojn !

—Sro E. Wanderley publikigis en la infano revuo "O Tico-Tico" bonan komedion de propagando de Esperanto.

—Forveturis al *Bahia* nia bona samideano dro José A. Boiteux, kiu reprezentos Brazilan Klubon en la 5.a Brazila Kongreso de Geografio.

—Dro E. Backheuser faris al la biblioteko de B. K. E. donacon de multaj esperantaj libroj kaj broŝuroj.

Minas Geraes.—Nia fervora samideano leŭtenanto Arthur Paulino de Souza, antaŭ nelonge elektita profesoro en Militista Kolegio, en *Barbacena*, faris tie bonan paroladon pri Esperanto al kiu ĉeestis multaj profesoroj kaj lernantoj.

Recevinte permeson de la direktoro de l' Kolegio, Kolonelo Esperidião Rosas, sro Arthur Paŭlino de Souza malfermis kurson en kiu tuj enskribiĝis granda nombro da lernantoj. La kurso funkcias dufoje en ĉiusemajne. "A Alvorada", organo de la lernantaro de l' Kolegio, publikigis bonan artikolon pri Esperanto kaj malfermis kurson per siaj lonoj. En *Barbacena* loĝas la ma nova esperantisto profesoro João Gonçalves, vicprezidinto de l' 4.a Brazila Kongreso de Esperanto.

En *Teixeiras* la l bonema publika profesorino s-ino Amanda Carneiro Bomfim organizis infanan teatron, en kiu naŭ graciaj knabinetoj ludis la Internacian Marŝon, de E. Wanderley. Nian koran saluton al tiu klera profesorino ! Multaj personoj el *Itaocára* enskribiĝis en la kurso de Esperantista Klubo "Junul ro". Sro Ba i i Assu pção donas leciono'n de Esperanto en *Coimbra* per pero de l' gazeto "A Vóz da Serra".

A. C. F.

O Esperanto no Estrangeiro

Inglaterra.—O sr. Paul Blaise fez uma interessante conferencia em Balham Commercial Institute, de Londres, com projecções luminosas. Em seguida foi aberto um curso sob os auspicios do London County Council. O sr. Blaise fez tambem uma conferencia no Rambler's Club, seguida de um curso pela senhora Blaise. Recomeçaram as conferencias de propaganda nos parques de Londres, pela realizada em Finsbury Park.

Noruega. — O grupo "Harnäs kaj Skutskär" trabalha activamente, mantendo cursos bem frequentados. A gazeta anti-militarista "Antikrigsorder" dedica o seu numero de Janeiro-Fevereiro, em grande parte, ao Esperanto, publicando o retrato de Dr. Zamenhof e texto em Esperanto.

França.—A propaganda continúa a ser feita por 25 grupos, em Angers, Coulommiers, Beaujeu, Beauvais, Paris, Rouen, Sotteville (em que se fazem troca de licções com soldados inglezes), Toulon, Toulouse.—Em Marselha, funccionam cursos duas vezes por semana no grupo local, onde reina grande actividade. Samideanos servios, russos, inglezes, visitam constantemente o grupo, assistem os cursos, fazendo assim uma excellente demonstração da utilidade pratica do Esperanto, que permitte, a pessoas de quatro nacionalidades differentes, a precisa intercomprehensão.—No Lyceu de Coulommiers abertura de um curso de Esperanto.

Hollanda.—Em Harlem effectuou-se a reunião trimestral da L. E. E. N.—Em Rotterdam, o sr. Coté apresentou a idéa da fundação de um muzeu esperantista.—A União Cooperativa "Walden", de Zaandijk, subvenciona a propaganda do Esperanto em Wormerveer.—160 soldados internados no campo de Harderwijk falam Esperanto fluentemente, depois de estudo facil.

Allemanha.—Em Schweidnitz foram abertos dois cursos, sendo um constituido por 20 soldados, e dirigido pelo sr. Pindur, um mutilado em combate.—Fundou-se o *Esperantista Grupo Berlin.*

Austria.—Abriu-se um novo curso em Pilsen, o qual conta já 33 membros. Um d'estes, regente de uma orchestra, fez executar com successo o hymno *La Espero.*

Suissa.—Em Burgdorf, além de reuniões, o sr. Krenger abriu um curso no gymnasio local.—Em Bern, Davos, Effretikon, Genebra, Lugano, Lyss, Zurich, continúam a funccionar cursos e as reuniões são frequentes.

Hespanha.—Realizou-se em Reus o 1.º Congresso da Confederação Esperantista Hespanhola e o 7.º Congresso da Federação Esperantista de Catalunha .A abertura de ambos os congressos foi presidida pelo Dr. Carulla, reitor da Universidade de Barcelona, que exprimiu os mais ardentes votos para que o Esperanto seja introduzido nas escolas publicas e particulares .No salão nobre da sociedade "Centro de Lectura" foi aberta uma exposição de objectos esperantistas, que despertou grande interesse. Obteve grande successo a festa denominada *Jogos Floraes.* O 1.º premio do Concurso Litterario foi ganho pelo poeta Artur Doménech Mas, de Barcelona, que escolheu rainha da encantadora festa a senhorita Lola Alimbau y Codina, de Reus. O ministro da Instrucção Publica fez-se representar pelo reitor da Universidade. As outras festas, excursões, sessões de trabalho, etc., foram tambem muito concorridas.—O grupo "Esperanto kaj Patrujo" tomou parte no peditorio em favor das victimas do paquete "Principe de Asturias", o que despertou muita sympathia para o activo grupo. Em Banyoles, Olot, Girona, Palafrugell, San Feliu de Guixols, Cassá de la Selva, Santa Coloma de Farnés, Molins de Rei, Palma de Malorca, Zaragoza, Bilbao, Tarragona, cursos e reuniões.

Japão.—Em Tokio, a Tokja Esp.-Societo reune-se no Café Macuŝita para exercicios de conversação, e na Escola de Physica para estudo da lingua e sessões. Numa das reuniões do Café Macuŝita, o sr. Sirai, um velho de sessenta annos, disse em grandioso Esperanto como travara conhecimento com a nova lingua e porque se tinha feito um adepto fervoroso. —Na Escola de Cégos de Tokio foi aberto um curso, que tem tido a frequencia media de 10 alumnos. —Outros cursos foram abertos em Tokio, Jokohama, Formosa.—Realizou-se em Tokio o 3.º Congresso dos Esperantistas Japonezes, com pleno successo, que faz prever grande desenvolvimento da idéa esperantista num futuro bem proximo.—Nos bairros de Aojama, Hongo, Uŝigome e Asakusa, foram organizados novos cursos pelo sr .Takasari.—Em Osaka fundou-se uma sociedade esperantista. Appareceu a *Sakai Esperantisto,* orgão de propaganda. Diversos jornaes publicam artigos e informações sobre o movimento esperantista.

China. — A Associação Esperantista Chineza (Shangai) conseguiu interessar 30 diarios pelo Esperanto. Duas escolas de Hunan abriram cursos de Esperanto. Em Nangking, a Escola Normal Official considerou o Esperanto como necessario, e incluiu-o no seu programma de estudo obrigatorio.

Republica Argentina.—A bibliotheca "Estudios Libres" fundou um novo grupo, que tomou o nome de *Tagiĝo.*—Em Zárate, fundou-se o grupo "Zamenhof".—Em Pergamino continúa com successo o trabalho infatigavel dos esperantistas locaes. Entre outros, organisaram uma reunião no salão nobre da Escuela Normal, onde o sr. L. Kelety fez uma conferencia muito interessante, em que demonstrou a utilidade do Esperanto, citando muitos factos occorridos durante a sua viagem a diversos paizes da Europa. O grupo local, *Verda Stelo,* conta já 95 membros.

N. B.

Novaj gazetoj ricevitaj

ESPERANTA BULTENO. Monata organo de la Esperantistoj en la Platriveraj Respublikoj. Direkcio: *Paseo Colon, 161. Buenos Aires. Argentina.* Abonprezo: E sterlande — 0,50 sm. trimonate.

Bibliografio

Germana Milito kaj Katolikismo. Elĉerpajoj kaj resumo en lingvo internacia Esperanto el la samtitola libro publikigita de la "Katolika Komitato por Franca Propagando". Broŝuro n-o tria de la eldonoj de la Komitato "Por Francujo, per Esperanto". 3, rue Garancière. Parizo. Francujo.

Jen estas listo de aliaj eldonajoj de la Komitato "Por Francujo, per Esperanto", kiujn ni ricevis:

N-o 1-a. *Kion pensas neŭtraloj pri la milito.* (I)

N-o 2-a. *Pri la Belga neŭtraleco.* (I)

N-o 3-a. *Respondoj al diversaj germanaj diroj.* (I).

N-o 4-a. *Kion pensas neŭtraloj pri la milito.* (II).

N-o 5-a. *Germanaj atestoj pri germanaj krimoj.*

N-o 6a. *La martiro de Belgujo.* (I)

N-o 7-a. *Pri la belga neŭtraleco* (II)

N-o 8-a. *Manifestado por la honoro de Miss Edith Cavell.*

La Milito de *Ru Shan.* Tiu ĉi libreto estas havebla ĉe la American Esperantist Co. Inc. West Newton, Mass., U. S. A. per la sendo de respondkupono.

Korespondado

Luiz Figueiredo Filho. 1.ª Secção da Contabilidade dos Telegraphos. *Praça 15 de Novembro. Rio de Janeiro. Brazilio,* deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Nur kolektas p. m. el la du Amerikaj kontinentoj.

Sino. Ventura Fernandez Silva. *Concepcion Jeronima, 19 Madrid. Hispanujo,* deziras korespondadi per ilustritaj poŝkartoj.

Garantia kaso

Kun la celo publikigi akurate la revuon Brazila Esperantisto, Brazila Ligo Esperantista decidis starigi *garantian* kason, kiu estos elspezata nur kiam la eldono de la revuo prezentos deficiton. La subskribinto pagos ne la tutan sumon sed la proporcian parton, laŭ la deficito pagota.

LISTO

Brazila Klubo "Esperanto"	5$000
D-ro Nuno Baena	5$000
Alberto Couto Fernandes	5$000
D-ro Venancio da Silva	5$000
Odilo Pinto	5$000
José Arthur Boiteux	5$000
Coronel Manoel Portilho Bentes	5$000
Everardo Bakheuser	5$000
Carlos Veloso	5$000
Methodio Maranhão	5$000
E. Felix Tribouillet	5$000
J. B. Mello e Souza	5$000
H. Motta Mendes	5$000
Major Lauriano das Trinas	5$000
Honorio Leal	5$000
João T. de Siqueira Magalhães	5$000

Livros em Esperanto

Acham-se á venda na Livraria Alves, á rua do Ouvidor, 166, na Livraria Gomes Pereira, á rua do Ouvidor, 91, na Livraria Castilho, á Rua S. José, 114 e na casa Braz Lauria, á Rua Gonçalves Dias, 78 ou Avenida Rio Branco, 142, diversos livros em Esperanto

TODOS OS VALES POSTAES E REGISTRADOS COM VALOR DEVEM SER DIRIGIDOS AO SR. E. FELIX TRIBOUILLET, THESOUREIRO DA BRAZILA LIGO ESPERANTISTA.

Pap. Confiança—Andradas, 71